der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

24. Jahrgang Nr. 151 (5/1988) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Monda Jardeko de la Kultura Evoluo

La Mondan Jardekon malfermis la Ĝenerala Direktoro de UNESKO sinjoro Federico Mayor la 21an de januaro 1988. Ĝi okazas 1988-97 sub la komuna protektado de UNO kaj UNESKO, la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj. Samtempe kun la de UNESKO proponita agadprogramo ĝi estas decidita fare de la 41a sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNO en 1988. La en ĝi fiksitaj taskoj kaj ĉiuj en ĝia kadro planitaj agadoj de la ŝtatojmembroj de UNO kaj UNESKO, de internaciaj, interŝtataj kaj neŝtataj organizaĵoj estas kunordigitaj de komitato. En ĝi troviĝas 36 ŝtatoj, elektitaj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO. Post ĉiu dua jaro oni ŝanĝos la duonon el ili.

La Ĝenerala Sekretario de UNO, Javier Pérez de Cuéllar en deklaro emfazis, ke la Monda Jardeko servu al la bonfarto de la homaro kaj al ĝia paca kunvivado. Oni celas, „krei novan pensmanieron, kiu akcelas la dialogon kaj la interkonsentitan agadon de unuopuloj, organizajoj kaj nacioj por solidare renkonti la sekvojn el la kultura evoluo.

La Sekretariato de UNESKO substrekis, ke lige kun tio oni komprenu kulturon ne nur kiel belartojn, sed kiel sociajn kondutojn, spertojn, kutimojn kaj praktikojn, sistemon de valoroj kaj konvinkoj, kiel antaŭkondiĉon kaj celon de la evoluo. La agadprogramo fiksas la kvar sekvajn ĉefcelojn:

— Konsidero de la graveco de la kulturo por la evoluo.
— Pliriĉigo kaj plifortigo de la kultura identeco.
— Pligrandigo de la partopreno en la kultura vivo.
— Akcelado de la internacia kultura kunlaboro.

Por tio estas planitaj konkretaj agadoj en internacia, regiona kaj nacia kadroj, kiuj varias de kulture artaj aktivecoj kaj programoj por la kvalifikado de fakuloj ĝis esploraj objektoj.

[El „Neues Deutschland" de 4. 2. 88 trad. Rudolf Burmeister]

Michael Behr

KION VALORAS ALILINGVAJ RESUMOJ?

1. Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de resumoj

Sendube, se en nacilingvaj fakaj ĵurnaloj aŭ publicaĵoj aperas resumoj en kelkaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto, tio povas efiki pozitive, ĉar

— ni atentigas pri la fakaj potencoj de Esperanto, kaj
— iu leganto (eble hungaro), kiu ne regas la aliajn prezentitajn lingvojn, povas diveni la enhavon el la esperanto resumo, pro la alta internacieco de la esperanta leksiko.

Belajn ekzemplojn ni montras en la aldonaĵo 1, tradukitaj fare de la kolego Erich Würker.

Sed ni konsciu pri la jenaj problemoj:

— Super la resumo ne estas menciita la lingvo de la resumo, ĉar tia mencio ne estas kutima. Sekve multaj legantoj eĉ ne scios, ke temas pri Esperanto.
— Resumoj enhavas tutajn frazojn, do ne nur pli malpli internacian leksikon, ne nur bone rekoneblajn substantivojn kaj adjektivojn, sed ankaŭ gramatikajn formojn de la verboj ne diveneblajn fare de nekonantoj de Esperanto.
— Resumon verki aŭ traduki, tio estas laboro, kaj ofte la esperantistoj ne kuraĝas fari tion. (Ekz. en Komputista Kuriero ni kelkfoje petis tion fari, sed neniu reagis.)
— Resumoj entute bezonas relative grandan spacon en fakĵurnaloj aŭ publicaĵoj. Pro tio kelkaj aŭtoroj aŭ redaktoroj rezignas pri ili. En tia situacio, estas relative malgrandaj la ŝancoj de esperantistoj persvadi aŭtoron aŭ redaktoron al esperanta resumo.

Resume pri esperantaj resumoj: Se eblas lanĉi ilin, ni faru tion, alikaze ni pripensu aliajn eblecojn.

Sed aliaj argumentoj validas rilate al nacilingvaj resumoj en esperanta fakĵurnalo. Miaj germanaj gekolegoj en mia laborejo volonte kaj scivoleme foliumas en kajero de „FOKUSO kuŝanta sur mia skribotablo. Sed ili iom hontas konfesi la nekomprenon eĉ de la titoloj kaj ĝoje akceptas mian buŝan tradukadon de la bildkomentoj kaj titoloj. Ili volonte legus germanlingvajn resumojn pri la artikoloj. Kial ne prepari ilin?

Aliflanke mi plene komprenas, ke la redaktoroj de FOKUSO ne presigas nacilingvajn resumojn, ĉar ja tiklas la demandoj:

— en kiom da lingvoj?
— kiujn lingvojn elekti sen diskriminacii?
— kiom da spaco oferi?

Sekve, laŭ mi, estus ege varbefika afero, se germana esperantista aktivulo preparus kaj multobligus germanlingvan resumofolion pri ĉiu numero de la ĵurnalo. Tia folio estus facile enmetebla por la abonantoj kaj ties germanaj gekolegoj, kaj ĝi estus ankaŭ aparte uzebla kiel varbilo, eĉ kiel reklamilo en aliaj germanlingvaj ĵurnaloj. La kolego André Weber verkis ekzemplon videblan en la aldonaĵo 2.

2. Tradukoj de tabelformaj sciencaj publicaĵoj

Se iu scienca publicaĵo ĉefe konsistas el tabeloj, ĉi-kaze ni havas pli grandan ŝancon traduki kaj eldonigi ankaŭ esperantan version, ĉar

— la tradukado ne estas tro temporaba,
— la kolumno-titoloj konsistas ofte nur el substantivo, kaj pro tio ili estas relative facile diveneblaj, kaj
— sekve la vendebleco por alilingvanoj estas supozeble iom pli granda.

Kolego Erich Würkert sukcesis eldonigi tian esperantan version, el kiu ni montras kelkajn ekzemplajn liniojn en la aldonaĵo 3.

3. Plurlingvaj enhavtabeloj de fakĵurnalo

Kontrolinte kelkajn germanajn fakĵurnalojn pri komputado en GDR, mi konsternite konstatis, ke ili enhavas n e k germanajn n e k alilingvajn resumojn, sed nur du el kvar de tiuj ĵurnaloj enhavas trioblan enhavtabelon, po unu en la germana, angla kaj rusa. Tia enhavtabelo ĉiam nur konsistas el aŭtoro, titolo kaj paĝonumero. Sekve iu rusa aŭ angla leganto teorie povus havi unuan imagon pri la supozebla enhavo. Tamen, kelkfoje la titolo konsistis el nura mallonggigo ofte nekonata eĉ al mezklera fakulo, kaj tiel transprenita kiel rusa aŭ angla titolo.
Rigardante la enhavtabelon de FOKUSO 4/87, ni trovas nur la paĝon kaj la titolon, sed ne la aŭtoron, kvankam la enhavtabela paĝo restis duone malplena. Mi nun ne proponas la enkondukon de trilingva enhavtabelo al FOKUSO por eviti diskriminacion.

4. Propono de enhavtabeloj kun ŝlosilvortoj

La propono celas

— per malmulte da laboro atingi relative grandan efikon, kaj
— distribui la laboron al diversaj personrondoj.

Mi proponas, ke la redaktoroj de FOKUSO bone eluzu la enhavtabelan paĝon, notante, nur en Esperanto, por ĉiu artikolo: la aŭtoron, la titolon, la paĝon, kaj enkrampe 5 ĝis 15 ŝlosilvortojn, kiuj karakterizas la fakan enhavon de la artikolo. Mi provis fari ekzemplon laŭ FOKUSO 4/87 en la aldonaĵo 4.
La membroj de Scienc-Teknika Sekcio aŭ Komisiono en la diversaj landoj traduku tiun paĝon nacilingven, metu tiun folion en la kajerojn, kaj uzu ĝin kiel apartan reklamilon (ald-o 5). Tiel ni havus vere informivan superrigardon pri la enhavo de la kajero, en tiu lingvo (se troviĝis tradukanto), por kiu ni entreprenis tiun malgrandan laboron.

Aldonaĵo 1: Resumo en Esperanto

CLASSEN, J.: Neues über die Apollo-Objekte, Veröffentlichungen der Sternwarte Pulsnitz, Nr. 19, 1982
(Novaĵoj pri la Apollo-objektoj, Publicaĵoj de la observatorio Pulsnitz en GDR, n-ro 19, 17 paĝoj, kun 3 bildoj, kun 8 resumoj, unu en Esperanto:)

Resumo

En ĉiam kreskanta nombro estas trovitaj planetoidoj kun nekutimaj orbitoj. Sub la nomo „Apollo-objektoj" oni resumas ĉiujn planetoidojn, kies orbitoj krucas la terorbiton. Tiuj povas kolizii kun la tero kaj postlasas depende de la cirkonstancoj grandajn meteoritajn kraterojn. La ĝisnunaj konsideroj pri tiuspecaj meteoritaj krateroj estas ekzamenataj kritike kaj novaj pripensadoj estas farartaj.

Aldonaĵo 2: Resumo nacilingva

KARDOS, Zsuzsa: Robotoj en industrio, en FOKUSO 1987/2

(Roboter in der Industrie, in FOKUSO 2/1987, internationale Zeitschrift über Aktuelles in Wissenschaft und Technik, in Esperanto)
Die Roboter dienen praktischen Zielen in der Industrie. Dargestellt werden die ersten Schritte der Einführung bis zur praktischen Anwendung und die weiteren Entwicklungsetappen.

Aldonaĵo 3: Ekzemplo de tradukita tabelforma scienca publicaĵo

CLASSEN, J.: Katalogo de 230 Meteoritaj Krateroj inkluzive de 76 Dubaj Objektoj, kun enkonduko kaj klarigoj en Esperanto, Publicaĵoj de la observatorio Pulsnitz/GDR, n-ro 12, 1987, 18 p.

(La originalo aperis germane, krome aperis versioj en angla, rusa, ĉeha, itala kaj Esperanto)

Fragmento el la tabelo:

N-ro	Nomo	Lando	Kvanto	Kategorio	Rimarkoj	Diametro (m)	Profundo (m)	Jaro
En Europo								
1	St. Magnus Bai	Britio, Ŝetl. Insuloj	1	C	maro	11 000	97	1971
2	Rochechouart Chassenon	Francio	1	B	Shatter Cones	15 000		1967
3	St. Imier	Svisio	1	D	kavajo	400		1976

Aldonaĵo 4: Proponita enhavtabelo kun ŝlosilvortoj, por FOKUSO

FOKUSO 4/1987

d-rino GÀL, Ilona: Pri la funkcio de spicoj en la nutrado p. 3-7
(Grupigo de nutraĵoj, difino de spicaĵo, grupigo, historio; efikoj biologia, kuraca, konserviga)

prof d-ro STOP-BOWITZ, Carl; d-ro MESZAROS, Béla; KOVASZ, Lajos:
Enkonduko en la biologion, p. 8-29
(Objektoj de la biologio, biologiaj sciencoj, strukturo de vivaj organismoj, vivulo, vivularo, metabolo, iritiĝemo, moviĝkapablo)

Aldonaĵo 5: Nacilingva enhavtabela folio

Inhaltsverzeichnis FOKUSO 4/1987

(Internationale Zeitschrift über Aktuelles in Wissenschaft und Technik, in Esperanto, abonnierbar bei: .....)
(Preis: 4 Hefte à 80 Seiten, pro Jahrgang für 24,— M)

Dr. GAL, Ilona Über die Funktion der Gewürze in der Ernährung (Einteilung der Nahrungsmittel, Definition von „Gewürz", Einteilung, Geschichte der Gewürze; biologische, Heil- und Konservierungswirkungen)

Gerda Häusler

Interfero inter la angla, la germana kaj Esperanto kiel fonto de eraroj

Enkadre de tiu ĉi analizo mi komprenas ‚interferon' kiel nekonscian, eraran uzadon de elementoj de unu lingvo laŭ la strukturmodeloj de alia lingvo, kiu dominas en la konscio de la lingvouzanto. Plej ofte la lasta estas ties gepatra lingvo, sed povas ankaŭ temi pri alia fremda lingvo.

Interfero okazas fakte sur ĉiuj niveloj de la lingvouzo. La plej grandan procentaĵon de la eraroj ĝi konsistigas sur la meza lingvonivelo, kie bazaj eraroj jam ne abundas, sed kie oni ankoraŭ pensas gepatrolingve kaj grandparte mense tradukas. Tial mi unuavice traktos interferajn erarojn de homoj posedantaj mezan nivelon de lingvokompetenteco. La plimulto el miaj ekzemploj koncernas la anglan influon sur la Esperanto-uzon de angloj, ĉar alilingvano ja pli facile ol samlingvano rimarkas interferon de fremda gepatra lingvo.

1. Mi komencu per la **fonetika interfero.**

Sur la kampo de fonetiko ĉiu esperantisto povas facile rekoni denaske anglan parolanton de Esperanto, kiu ankoraŭ ne dekutimiĝis de siaj anglaj prononckutimoj.
La plej okulfrapaj apartaĵoj estas la diftongoj (oŭ) kaj (ej), kiujn li paro-

las anstataŭ (o) kaj (e:) Esperanto, ne. lafoje oni povas ankaŭ aŭdi (hœvi) anstataŭ **havi.** Alia fonto de interfero estas la prononcado de -er- kaj -ir-, kiujn angloj kutime prononcas kiel (ə:), ekz. (bə:do) anstataŭ **birdo.**

Inter la konsonantoj devias de la esperantaj normoj la prononco de r, kiu anglamaniere aŭ paroliĝas kiel langpinta konsonanto, ekz. en (Esperanto), aŭ tute ne prononciĝas, tiel ke armi kaj **ami** povas esti prononcataj sen diferenco.

Ĉu tiuj ĉi apartaĵoj estas eraroj aŭ ne? Ĉu ili malhelpas la interkompreniĝon? Mi pensas, ke ili nur ĝenas, se ankaŭ la aŭskultanto ankoraŭ estas nesperta esperantisto. Oni povas facile alkutimiĝi al ili, kiel oni ankaŭ alkutimiĝas al la prononcmaniero de usonano, se oni nur lernis la britan anglan. Mi konsentas kun John Wells, ke gravas sole la fonemaj distingoj kaj ke oni devas nur atenti ilin, sed povas allasi minimumon da alofonoj, kiuj ne kaŭzas miskomprenon, nur anglan koloron. Aplikita al miaj ekzemploj, tio signifas, ke nur mia lasta ekzemplo, **ami** anstataŭ **armi,** estas interfera eraro.

2. Mi nun venu al la **grafema interfero.**

Sur la kampo de la ortografio mi observis grandan necertecon inter **s kaj z** en vortoj, en kiuj la angla havas la literon s, prononcata kiel voĉa (z). Ĉi tie la angloj ofte erare skribas s, sed ĝuste prononcas (z) laŭ sia kutimo. Do tipaj grafemaj interferaj eraroj de angloj estas:

angla	**interfero**	**Esperanto**
to present	+presenti	prezenti
to use	+usi	uzi
to visit	+visiti	viziti
museum	+museo	muzeo
result	+resulto	rezulto

Simila fenomeno sur la kampo de vokalismo estas la interfero inter la literoj **e kaj i,** kie la angloj skribas e kaj prononcas (i), sed kie en Esperanto oni ankaŭ devas skribi **i:**

angla	**interfero**	**Esperanto**
to defect	+defekti	difekti
to define	+defini	difini
to relate	+relati	rilati
to receive	+recevi	ricevi

Ekzemplo de interfero, kie du anglaj literoj, **u kaj o,** koincidas en unu sono (ʌ) kaj kie angloj ankaŭ erare transprenas la anglan skribmanieron, estas

+**s**umero
(angle s**u**mmer, resp. s**o**mero).

Mian lastan grupon de grafemaj interferaj eraroj konsistigas la erara uzo de **diakritaj signoj,** plej ofte la ellaso de ili. Mit trovis:

+**g**ardeno anstataŭ **ĝ**ardeno, kiu mia opinie estas klara ekzemplo de interfero de la angla garden, dum

+**log**i anstataŭ **loĝ**i kaj

+**dom**a**g**e anst. dom**aĝ**e

povus same bone esti atribuataj al franca influo.

(France **loger, dommage,** prononcataj (ʒ) sen speciala supersigno)

3. Per tio mi forlasu la ortografion kaj transpaŝu al la **gramatiko.** Laŭ Manfred Gerbert la gramatiko estas la sfero, kie interferaj eraroj pleje gravas, tial ke ili multobliĝas, se certa gramatikaĵo ripete estas misuzata. Sur la kampo de la **pronomoj** mi trovis malĝustan transprenon de la angla persona pronomo **‚it'** en senpersona uzo:

+Ĝi ŝajnis al mi anst. Ŝajnis al mi

+Ĝi estis Iren, kiu anst. Estis Iren, kiu ...

Eraran uzadon de la rilativa pronomo montras la ekzemplo

+La poŝtkarto +**ke mi kunsendas** anst. kiun,

evidente sub franca influo: **la carte postale que je t'envois.**

Pluan malfacilaĵon kaj sekve fonton de eraroj formas la anglaj nedifinaj pronomoj **‚some'** kaj **‚any'.**

Some of the members of the choir reflektiĝas kiel

+iuj el la membroj de la ĥoro anst. kelkaj membroj;

I didn't understand anything iĝas mi +**ne** komprenis +**ion** anst. mi komprenis nenion.

Multaj interferaj eraroj ankaŭ okazas sur la limo inter gramatiko kaj leksiko. Nur du ekzemploj el la sfero de la **prepozicioj:**

Li interesiĝas +**en** lingvoj sub la influo de He is interesed in languages

Li serĉis +**por** loko sub la influo de He looked for a place

4. Mia lasta — kaj eble plej interesa — grupo traktas la **leksiko-semantikan interferon.** Tiu ĉi grupo estas la plej granda laŭ la nombro de unuopaj ekzemploj, kaj oni povus trovi ankaŭ multajn aliajn.
Sub la influo de anglaj **kunlokadoj** ekestas eraraj esperantaj kunlokadoj kiel:

+preni ekzamenon
to take an exam anst. ekzameniĝi, trapasi ekzamenon
Mi baldaŭ +prenos la mezan ekzamenon

+preni longan tempon
to take a long time anst. bezoni
Li +prenis longan tempon organizi mian vojaĝon

+provizi varojn
to provide goods anst. vendi, disponigi
La butikoj +provizas varojn kiuj ne estas haveblaj en nia vilaĝo

+rezervi tranoktejon
to reserve a room anst. mendi
Mi ankoraŭ ne +rezervis tranoktejon

+vidi la kuraciston
to see the doctor anst. konsulti

+ĉeesti lernejon
to attend school anst. vizitadi, frekventi la l., iri en la lernejon

La angla verbo **‚to go'** korespondas ne nur al ‚iri', sed ankaŭ al ‚veturi'. Pro tio ekestas erara uzado de ‚iri' anstataŭ ‚veturi'. Ekzemple:
Mi dezirus +reiri al Magdeburg
I'd like to go to Magdeburg again
anst. reveturi
La angla **‚to learn'** signifas ‚lerni' kaj ‚ekscii'. Tial:
Mi ĝuis +lerni ke vi povis partopreni IFER
I was pleased to learn that you were able to participate
Mi +lernis ke li eniros malsanulejon
I learnt that he would go into hospital
Du aliaj verboj, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn kaj por angloj kaj por germanoj estas **‚ŝati' kaj ‚plaĉi'** (‚schätzen' kaj ‚gefallen'). Malĝusta uzado:
El ĉiuj urboj Budapeŝto +ŝatis mi la plej bela anst. Budapeŝto pleje plaĉis al mi
Eble ĉi tie ankaŭ efikas la interna interfero, nome la simileco de ‚ŝati' kaj ‚ŝajni'. Ja ankaŭ estus penseble, ke tiu frazo devis signifi:
El ĉiuj urboj Budapeŝto ŝajnis al mi la plej bela.
Evidente eĉ pli malfacila por angloj estas la korekta uzo de **‚ĝui' kaj ‚ĝoji'.** Mi vidas la kaŭzon en la fonetika simileco de ‚ĝoji' kaj ‚enjoy' kontraste kun ilia semantika diferenco, ĉar la angla ‚to enjoy' ĝuste **ne** estas la ekvivalento de ‚ĝoji', sed havas la signifon ‚ĝui'. Sekve, angloj daŭre miksas tiujn du verbojn.
Ĉe la sama persono mi trovis ĝustan uzon en:
Mi ĝuas vojaĝi
I enjoy travelling
Mi ĝuus korespondi kun vi
I'd enjoy corresponding with you
kaj malĝustan uzon en:
Mi +ĝuas ke Esperanto plaĉas al vi
anst. ĝojas
I'm pleased that you like Esperanto
Mi +ĝuas ke via feriado estis ĝuinda
anst. ĝojas
I'm pleased that your holiday was enjoyable

5.1. Nun al kelkaj trajtoj de la germana interfero, unue en la **fonetiko.** Kelkfoje alinacianoj miskomprenas aŭ tute ne aŭdas nian r antaŭ konsonantoj, kiu ne sufiĉe ruliĝas, same kiel la r de la angloj, ekz. en ‚birdo', ‚armo' (ne: ‚bildo', ‚amo').
Germanoj havas malfacilaĵojn pro la germana interfero en vortoj kiel anstataŭ — anstatt, ĉirkaŭ — zirka. Ili miksas vortojn kiel stato kaj ŝtato, stelo kaj ŝtelo. (Mi aŭdis: „Nun ni kantu ‚Vivu la +ŝtel'")

5.2. Koncerne la **grafeman interferon,** ni havas similajn problemojn kiel la angloj kun s kaj z, e kaj i. Komparu:

germ.	**interfero**	**Esperanto**
präsentieren	+presenti	prezenti
Visite	+visito	vizito
Museum	+museo	muzeo
Resultat	+resulto	rezulto
Defekt	+defekto	difekto
Definition	+defino	difino
Relation	+relato	rilato

5.3. En la sfero de la **gramatiko** estas malfacile por germanoj, diferencigi

inter **adjektivo kaj adverbo,** kie la germana laŭforme ne havas distingilon. Kiel nelingvisto sciu, ke

Das Wetter war warm kaj
Es war warm

necesigas en Esperanto du diversajn formojn, nome la adjektivon en la unua frazo, sed la adverbon en la dua?

La vetero estis varm**a** kaj
Estis varm**e**.

Ofte oni povas aŭdi: Estis +varm**a**.

Plia ekzemplo de gramatika interfero estas la malĝusta uzado de dua **imperativo** post ‚bonvolu':

Bonvolu +transdon**u** mian leteron,
mensa traduko de

Bitte **übergib** meinen Brief!

Tie la imperativo ‚übergib' estas tradukata per la imperativo ‚transdonu', sed oni preteratentas, ke en Esperanto ja ‚bonvolu' jam estas la imperativo kaj tute ne la sama kiel ‚bitte'.

Tie rekomendindas traduk-ekzercoj, elirantaj de alia germana versio, nome

Sei so gut, meinen Brief **zu übergeben,**
tial ke nun ekvivalentaj gramatikaj formoj koincidas en ambaŭ lingvoj:

imperativo	**infinitivo**
Sei so gut	zu übergeben
Estu bonvola/	transdon**i**
Bonvolu	

Verŝajne la plej granda problemo en la esperanta gramatiko, ne nur por angloj kaj germanoj, estas la distingo de **transitivaj kaj netransitivaj verboj,** ankaŭ pro manko de formala distingilo en niaj gepatraj lingvoj.

Eble mia prelego jam daŭras tro longe kaj vi ne volas,
ke mi daŭrigu?
Mi tuj finos.
Mia prelego tuj finiĝos.

En la limregiono inter gramatiko kaj leksiko la **prepozicioj** estas malfacile lerneblaj ankaŭ por germanoj. Mi devas dufoje pripensi, ĉu estas ĝuste diri

sur la kampo	
auf dem Gebiet	aŭ +en la kampo
	inn the field,
sur la bildo	
auf dem Bild	aŭ +en la bildo
	inn the picture

Multaj germanoj interesiĝas +por Esperanto anst. pri Esperanto, sed ni jam estas feliĉaj, se ili entute interesiĝas.

Gastama Hungario '89

Jam aperis kaj estas akirebla la sekvajara programoferto de la Esperanto-Sekcio de la Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo Express. La 12-paĝa kajereto enhavas la indikojn pri tiuj aranĝaĵoj, kies organizadon partoprenas ankaŭ Express. Tiuj aranĝoj estas:

— JER — Junulara Esperanto-Renkonto, en Montaro Pilis
— ZIP — Zamenhofa Internacia Pacmarŝo kaj BBB-renkonto (Verócemaros-Budapest, 1989.06.05-07/07-10)
— IJS — Internacia Junulara Semajno (1989.07.02-08)
— LEB-LEM-LEP Internacia Esperanto-Lingvotendaro en Kiliántelep (1989.07.04-14)
— IREN — Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj (Abaliget, 1989.07.15-24)
— SELE — Somera Esperanto-Lernejo en Eger I. (por ĉiuj interesiĝantoj, 1989.08.08-14)
— SELE — Somera Esperanto-Lernejo en Eger II. (por pedagogoj, 1989.08.15-21)
— SELT — Somera Esperanto-Lernejo en Tata (1989.08.02-08)
— SEKEL — Someraj Esperanto-Kursoj en Lingvolaboratorio en Szombathely (1989.08.06-15)
— 19a VEF — Vintra Esperantista Ferio en Budapest (1989.12.28-1990.01.02)

Interesiĝantoj petu la kajeron senpage de la Esperanto-Sekcio de Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo Express, Budapest V., Szabadság tér 16.II/23, H-1051; tel.: (36-1) 113-523 kaj 317-777/22,39; telekso: 225384 TUREX

Sabine Fiedler

CITILOJ – ĈU NUR ILOJ POR CITI?

La citiloj estas unu el la interpunkciaj signoj de Esperanto. Oni uzas ilin por citi, t.e. por laŭvorte ripeti skriban aŭ parolan tekston.[1] Laŭ la formo la citiloj povas esti divers-specaj. Depende de nacilingvaj apartecoj kaj de presteknikaj kondiĉoj ni trovas duoblajn akutajn angulojn kaj unuoblajn aŭ duoblajn komojn supre aŭ malsupre de la linio. En beletraj verkoj oni uzas citilojn por marki rektan parolon, je kio en la nuntempa literaturo en tiu kazo oni ankaŭ povas renkonti la haltostrekon. Krome per citiloj estas markataj propraj nomoj, kiel titoloj de ĵurnaloj, filmoj ktp.

Trarigardo tra la Esperanto-gazetaro kaj tra monografioj pri la plej diversaj temoj[2] montras tamen, ke la supre priskribita funkcio — marki citaĵojn — (je kies mencio la gramatikoj cetere limiĝas) ne estas la ununura sfero de aplikado por citiloj. Multaj aŭtoroj uzas ilin metakomunike[3] por implicite komenti sian vortuzon kaj por tiamaniere pliklarigi la sintenon pri la tekste prezentita fakto. Tion montru kelkaj ekzemploj:

> La E-movado kiel **„neŭtrala"** movado estas ideologie ege heterogena. („der esperantist" 5/1984, p. 111)
>
> ..., kiu povas fariĝi **„savringo"**, se la energia krizo minacas la homaron. (SAEST, p. 15)
>
> De **„blankaj nanoj"** ĝis **„nigraj truoj"** („Homo kaj Kosmo" 3-4/1981, p. 19).

La celo de tiu ĉi kontribuo estas priskribi kelkajn ĉefajn motivojn por la uzado de citiloj en metakomunika funkcio. Ni subdividas en 7 grupojn, konsciante tamen, ke tiuj ne ĉiam estas klare disigeblaj:

a) Per citiloj la aŭtoro ĝenerale signalas, ke la elektita vorto ne estas tutplene konforma al la nomenda objekto. Li tamen uzas ĝin — aŭ intence pro stilistikaj kaŭzoj aŭ neeviteble sekve de mankanta pli trafa vorto:

> Se Conan Doyle, ..., finfine tediĝis de sia detektivo, kaj en 1892 **‚mortigis'** lin en lasta aventuro. Poste, sed ne ĝis 1904, Conan Doyle **‚revivigis'** lin en lasta romano kaj lasta novelaro. (Boulton, p. 363)
>
> La hispana P. Digbeus konstruis en la jaro 1653 sian skribsistemon, uzante romajn kaj arabajn ciferojn. Unu frazo en tiu **„lingvo"**: XXXIX. 4. XLII. 8. III. 1. (Pechan, p. 16)

b) La markado per citiloj ofte esprimas prijuĝadon, plej ofte negativan. La aŭtoro intencas montri, ke li transprenas fremdan aŭ ĝeneralan vortuzon, kiun li ne aprobas:

> ..., estis instigo por principa okupo kun la problemo de **„artefarita lingvo"**. ("Esperanto — la internacia lingvo, sciencaj aspektoj", p. 23)
>
> Ĝi estis malkompetenta kaj ne dokumentita **„verko"** de iu ... („Socipolitikaj aspektoj ...", p. 32)

Tiu celo de distanciĝo estas observebla en pripolitikaj tekstoj:

> Revizionismaj teorioj pri **„klasa paco"**, **„kresko senbatala al la socialismo"** ktp. ... („Socipolitikaj aspektoj ..., p. 52/53)
>
> Al la ĉefkunveno estis rezervita nur konsila karaktero, kaj membroj kun **„kontraŭstata"** sinteno ne povis aparteni al la Asocio. („Socipolitikaj aspektoj ...", p. 88)

c) Krome citiloj estas uzataj por atentigi pri metafora esprimmaniero:

> Sincere dirite nun ankoraŭ mankas **„frato"** de via verko, la „Esperanto-Germana Vortaro". („der esperantist", 5/1984, p. 114)
>
> La **„skeleto"** de la frazo evoluas de la komencaj simplaj frazotipoj al pli kompleksaj. („Gvidlibro ...", p. 330)

d) En instrumaterialoj kaj popularsciencaj tekstoj la aŭtoro ĝenerale respektas la parte mankantan scion de la leganto per klarigoj pri la signifo de terminoj. Tiuj klarigoj aŭ komentarioj ofte estas signataj per citiloj:[4]

La k a t o b l e p o — **‚malsupren rigardanto'** — de Etiopujo mortigas, se oni rigardas ĝiajn okulojn.
(Boulton, p. 305)
Pazigrafioj (el la greka **„skribo por ĉiuj"**) estas ... („Esperanto — la internacia lingvo, sciencaj aspektoj", p. 95)

En tiaj tekstoj termino ĉe sia unua uzo ofte estas markata per citiloj. Post la tiamaniera enkonduko ĝi estas rigardata kiel konata kaj la citiloj forrestas:

Sub la esprimo **„b i o m a s o"** ni komprenu la tutan organikan mason, kreitan per fotosintezo — do ne nur la trunkolignon, sed ankaŭ maldikan lignon, branĉojn, ŝelon, arbostumpojn, radikojn kaj la asimilorganojn. ... Tamen, se ni pripensos, ke ..., kaj se samtempe ni kalkulos kun la raciiga prilaborado de la **b i o m a s o,** ni ...

e) En fakaj aŭ sciencaj tekstoj la citiloj ne malofte montru, ke vorto reprezentas momentan aŭtoran formon aŭ ĝenerale akceptitan uzon, sed (ankoraŭ) ne havas la staton de science preciza termino:

La instruado de la parolo ekestas laŭ la sekva vico: reproduktiva parolo laŭ la lernolibra materialo — normaligita parolo de la instruisto (t.e. **„k l a s l i n g v o"**) ...
(„Gvidlibro ...", p. 313)
La **„tradiciaj"** energio-fontoj ...
(SAEST, p. 11)

f) Pli malofte en la Esperanto-gazetaro estas trovebla la uzado de citiloj kiel signalo por ironio:

Krome la lernolibro ofertas: ... 2. ilustrajn tabelojn (ankoraŭ sen paĝciferoj) je la temoj: hejmaj kaj sovaĝaj animaloj (...), birdoj (mi rekomendas envicigi en la liston de birdoj apud la kolombo la kolimbon por konsciigi la **„malgrandan"** diferencon kaj ...
(„der esperantist" 1/1986, p. 18)

Per la citiloj la aŭtoro indikas, ke la diferenco fakte ne estas malgranda, sed granda.

g) Dum la uzoj de citiloj priskribitaj sub a) — f) estas entute konformaj al tiuj troveblaj en la naciaj lingvoj[5], fine estu menciata apliko de tipografia rimedo tipa por Esperanto. Temas pri esprimoj, kiuj nomas objektojn, ideojn ktp., kunligitaj kun la lingvo, la movado aŭ la historio de Esperanto:

... kaj aliflanke iuscenca izoliĝemo en la **„verda familio"** mem. („der esperantist" 5/1980, p. 104)
... la gazetaro de **„Esperantujo"** ...
(„Socipolitikaj aspektoj ...", p. 104)

Kiel la ekzemploj montras, per la citiloj ĉi tie ne malofte estas esprimita humura, aŭ eĉ iomete memmokanta nuanco.
En la montritaj ekzemploj la citiloj ofte estus substitueblaj per metakomunikaj komentarioj, kiel „se mi rajtas esprimi tiamaniere", „laŭdire" aŭ ankaŭ ĉio „tiel nomita". Ĉiukaze estas la aŭtoro mem, kiu decidas pri la uzado de citiloj. Sekve eblas, ke en diversaj tekstoj ni trovas samajn esprimojn kaj markitajn kaj nemarkitajn per citiloj:

Ni memoru la debaton pri la difino de „k o n c e n t r e j o" en PIV, tipa realajo el la **„III-a regno"!** („der esperantist" 1/1981, p. 14)
Esperanto dum la **Tria Regno** („Socipolitikaj aspektoj ..., p. 84)

Nedevigite per la interpunkciaj reguloj la aŭtoro propravole aldonas la informon, ke uzata esprimo devas esti specife akceptata kaj interpretata. En tiu senco la uzo de citiloj montras la responskonscian rilaton de la aŭtoro al sia leganto kaj povas subteni la komprenadon de la teksto en la dezirita maniero. Sed grave estas, ke citiloj ne estu nura signo de senkulpigo, kiu montras, ke la aŭtoro ne pretas transpreni la respondecon pri sia lingvo-uzo.

Notoj

1 Komp. Plena Analiza Gramatiko. Rotterdam 1985, p. 34

2 Tiu ĉi kontribuo baziĝas sur analizo de ĉirkaŭ 3000-paĝa tekstmaterialo, al kiu apartenas:
— „der esperantist" 1980—1986
— „Homo kaj Kosmo" 1981—1984
— Auld, W.: Paŝoj al Plena Posedo. Budapeŝto-Madrido 1984
— Barcsay, Z. (Red.): Metodiko en la Praktiko. Paderborn 1982

— Blanke, D. (Red.): Esperanto — lingvo, movado, instruado. Berlin 1977
— Blanke, D. (Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-Movado. Budapest 1978
— Blanke, D. (Red.): Esperanto. La internacia lingvo — sciencaj aspektoj. Berlin 1979
— Boulton, M.: Faktoj kaj Fantazioj. Rotterdam 1984
— Pechan, A. (Red.): Gvidlibro por Supera Ekzameno. Budapest 1979
— SAEST (Kolekto de referaĵoj el la Internacia Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko). České Budějovice 1982.

3 Sub „metakomunika lingvouzo" aŭ „metakomunikado" ni komprenas la lingvan agmanieron, per kiu la propra komunikado estas interrompata kaj mem fariĝas temo de komunikado. Tiamaniere „metakomunikado estas komunikado pri komunikado. Ĝi ĉefe celas al subteno de komprenado kaj povas havi la formon de tuta paragrafo, de frazo, unuopa vortgrupo aŭ vorto kaj — kiel niaj ekzemploj montras — ankaŭ de interpunkcia signo.

4 Tiu ĉi uzo de citiloj estas menciita en PAG (komp. noto 1) p. 191. Sed ni ne samopinias kun la aŭtoroj, kiuj rigardas „vorton post s i g n i f a s , kiu indikas sencon aŭ tradukon de alia vorto" kiel „eksplicitan citaĵon".

5 Komp. Klockow, R.: Linguistik der Gänsefüßchen. Frankfurt/M. 1980.

Esperanto progresas ĉe PROGRESS

Nia redakcio ricevis leteron de A. K. Aveliĉev, direktoro de la renoma soveta Eldonejo PROGRESS. El la letero evidentiĝas, ke tiu fama firmao serioze ekinteresiĝis pri Esperanto. Ni publikigas la leteron de Aveliĉev: „Ekde 1989 la sovetia eldonejo PROGRESS, eldonanta socipolitikan kaj soci-sciencan literaturon en fremdaj lingvoj, komencos eldoni librojn en Esperanto. La unua tiulingva libro estos TRAROMPO, verkita far kolektivo de la sovetiaj kaj usonaj sciencistoj kaj dediĉita al la soci-ekologiaj postsekvoj de nuklea milito. La dua kaj la tria eldonajoj de PROGRESS en Esperanto estos bildlibroj „1905: Prologo" kaj „1825: Komploto". La eldonejo planas eldoni ankaŭ alian socisciencan kaj socipolitikan literaturon en Esperanto, inkluzive librojn dediĉitajn al la historio, evoluo de Esperanto kaj al la tutmonda esperantista movado. Grave kontribuas al preparado de la eldonajoj la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE).

Vi povas mendi bezonatan parton de la eldonkvanto pere de eksterkomerca unuiĝo „Mejdunarodnaja Kniga" („Internacia Libro"), kiu garantias plenumon de Via mendo."

Planataj libroj:

1) M. Nilin — J. Nozdrin: Oceano, kolore ilustrita, 17 x 25 cm. La homo venis el la oceano antaŭ dekmiloj da jaroj. Sed ĝis nun li scias pri ĝi konsiderinde malpli multe, ol, ekzemple, pri misteroj de la atomo. La bildlibro invitas vin en allogan vojaĝon tra tempoj kaj oceanoj de la planedo.

2) E. Nikita — B. Lapŝin: 1905: Prologo, bildlibro, 17 x 24 cm, 160 p. (1989)
Rusi-japania milito, reprezalioj de la carismo, strikoj de laboruloj, subprematoj de malfacilaj laborkondiĉoj — ĉio en la lando spiras je Revolucio, je tiu Revolucio de 1905 — 1907, kiu iĝis prologo de la Granda Oktobro 1917.

3) E. Dobrovoskaja — J. Makarov — V. Aleksees: 1825: Komploto, bildlibro, 17 x 24 cm, 160 p. (1989)
La 14a de decembro 1825. La hieraŭaj herooj de la milito kontraŭ la caro. Kio estis tiuj kuraĝaj homoj? Kion ili aspiris, kial ili malvenkis, ĉu la ribelo efektive estis malvenko?

4) K. Marx — F. Engels: Manifesto de Komunista Partio, (1990)
La unua programa dokumento de marksismo.

Eldonejoj PROGRESO (Moskvo) kaj José Martí (Havano) por Esperanto

La menciitaj du eldonejoj komune eldonos libron Esperante, kies titolo estas: TRAROMPO: Formiĝo de la nova pensmaniero. La sovetiaj kaj okcidentaj sciencistoj alvokas al la mondo sen militoj, 370 p., ilustrita, (1989).
La libro havas la epigrafon „Al niaj gefiloj kaj genepoj". Apenaŭ oni povas elpensi ion pli bonan, konsiderante, ke la libro estas dediĉita al la generacioj de Tero, kiuj devas liberigi la homaron disde la minaco pri tutmonda nuklea katastrofo. La aŭtoroj de la libro estas sovetiaj kaj usonaj sciencistoj kaj sociaj agantoj, kiuj komprenis, ke la militoj iĝis anakronismo de nia tempo, ke la milita pensmaniero kontraŭas al la nova politika pensmaniero, kiun aplikas ĉiam pli granda kvanto de politikistoj el la plej diversaj landoj. Nun iĝis klare, ke la homa gento povas influi al sia propra evoluo farinte konscian elekton: ĉu daŭra nuklea vetarmado aŭ liberiĝo de la mortige danĝeraj arsenaloj. Sed por tio homaro devas fari en sia konscio TRAROMPON. La libro devas helpi al tio.

Inter la artikoloj de la libro estas:
— Komputilaj sistemoj kaj nuklea milito;
— Nefidindeco de la kontrolo pri la nukleaj fortoj;
— Junularo kaj nuklea milito;
— Supertasko — resti viva;
— Modelo de malamiko kaj procezo de ŝanĝoj;
— Nuklea malarmado: idealo kaj realo;
— Influo de la usona socia aktivularo al la kontrolo pri la vetarmado;
— Rekonstruo de la sovetia socio;
— Disvastigo de la ideo pri la mondo sen militoj; k. a.

Nekonsekvencaj formoj de propraj nomoj

Tradicia asimilado kaj esperantigo

Kvankam oni povas ankaŭ dum la tuta dua jarcento de Esperanto pridiskuti la temon de propraj nomoj en Esperantaj tekstoj, estas kelkaj kazoj, kiam esperantigitaj formoj antaŭ longe estis enkondukitaj, uzitaj kaj ankaŭ registritaj en konsultlibroj. Sekve de tio, ne havas sencon rifuzi la uzadon de ĝuste tiuj nomformoj, kiuj jam estas ĉehejme en la lingvo.

Ankoraŭ unu kritikindaĵo estas la kaosa kutimo de kelkaj redakcioj, kiuj jen asimilas nomojn, jen uzas la etnolingvan formon, sen tiu komprenebla kialo. Ŝajnas, ke se oni starigas principon, oni almenaŭ apliku ĝin konsekvence.

Manko de klaraj gvidlinioj

Mi rimarkis plurfoje en la magazino **Monato,** ke la traktado de propraj nomoj ne estas ortografie konsekvenca, ne nur tra la tuta kajero sed ankaŭ en la sama artikolo kaj eĉ en unu frazo. En bildteksto (**Monato,** 1/1985,, pĝ. 23) troviĝas du nomoj, Jakob Fugger, neasimilita formo, kaj Albreht Direr, fonetika transskribaĵo de Albrecht Dürer. Tamen, en la apuda kolumno ne ricevis fonetikan formon la familia nomo de Rudolf Diesel, kvankam en la sekva linio troviĝas la nomo de lia inventaĵo, la dizel-motoro!

Pli okulfrapa ekzemplo de ĉi-speca konfuzo aperas en la artikolo titolita „Marburga Manifesto" (**Monato,** 2/1985, pĝ. 23). En la tria kolumno du alineoj enhavas listigon de 14 propraj nomoj. Nur kvar, Konfuceo, Luko, Mateo kaj Tobio, estas asimilitaj. Sed ankoraŭ kvin nomoj estas registritaj en **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV), do ankaŭ ili devas havi Esperantajn formojn. Jen la nomoj.

1.	Augustinus	— Aŭgusteno
2.	Mahabharata	— Mahabarato
3.	Thales	— Taleso
4.	Thomas el Aquino	— Tomaso la Akvinano (PIV, pĝ. 27)
5.	Voltaire	— Voltero

Esperantigo de la restantaj kvin nomoj ne prezentas obstaklojn. Miaj proponoj baziĝas sur traduko, kie eblas; alie mi preferas apliki la grafisman principon.

1.	Albertus Magnus	— Alberto la Granda (analogie kun Charlemagne-Karolo la Granda)
2.	Herder	— Herdero
3.	Hobbes	— Hobeso
4.	Lun-yü	— Lunjuo
5.	Zamenhof	— Zamenhofo

Estas ja strange, post la longaj pasintjaraj diskutoj sur la paĝoj de **Monato** pri la diversaj manieroj literi proprajn nomojn kaj indiki ilian prononcon fonetike, ke nun totala kaoso regas. Kiu respondecas pri tio — la aŭtoroj de la koncernaj tekstoj, la redaktoro, la korektanto de presprovaĵoj—aŭ ĉiuj kune?

Kaoso ankaŭ en fakaj tekstoj

Ni ekzamenu ankoraŭ kelkajn ekzemplojn, kiuj montras la elekton de eraraj nomformoj, ĉar la verkintoj de la koncernaj artikoloj ne konsultis PIV por kontroli, ĉu jam ekzistas esperantigita formo de ĉiu propra nomo, kiun ili uzis.

En **Herolodo de Esperanto** (2/1987, pĝ. 3 kaj 3/1987, pĝ. 3) aperis artikolo el la plumo de Amri Wandel, fakulo pri la astronomio. Li skribis pri Pluto, Galileo kaj Kalvin. Nu, Pluto estas la helena dio de la riĉeco, sed en la teksto temis pri la planedo, kiu en Esperanto estas Plutono. La ĝusta nomo de la itala matematikisto, fizikisto kaj astronomo, **Galileo,** estas Galilejo, sed Wandel uzis la nomon Galileo, kiu estas regiono norde de Palestino. PIV informas, ke Kalvino (ne Kalvin) estis protestanta franca reformatoro. Ĉiuokaze ĝi estas malĝusta en la kunteksto, ĉar la aŭtoro skribis pri la kelvinskalo de temperatur-mezurado, nomata laŭ la brita fizikisto W. T. Kelvin (Kelvino).

Se profesiulo fuŝe verkas pri la propra fako, la situacio de laiko, kiu pritraktas fakan temon, estas senespera. Tion ilustras artikolo de Renato Corsetti pri la etruskoj (**Heroldo de Esperanto,** 12/1984, pĝ. 3 kaj 13/1984, pĝ. 3). En kolumno A estas la eraraj formoj de

bone konataj propraj nomoj de la antikva historio. La ĝustaj formoj ĉiuj registritaj en PIV, troviĝas en kolumno B.

A	B
Dionisus	Dionizio
Eneas	Eneo
Herodotus	Herodoto
Kikero	Cicerono
Remus	Remo
Romulus	Romulo
Tarkŭinjus	Tarkvinio
Pompei	Pompejo
Tiber	Tibero

Konkludo

Kvankam PIV, eĉ kun la **Suplemento** de 1987, estas nek plena nek perfekta, ĝi tamen estas fonto de multaj asimilitaj propraj nomoj. La t.n. bonaj aŭtoroj ne hezitas uzi esperantigitajn nomformojn, do tiuj, kiuj ne sekvas tiun tendencon, ĉu pro obstineco, ĉu pro nescio, ne marŝas laŭtakte sur la tereno de la evoluigo de Esperanto.
Reviziita: julio 1988

Bernard GOLDEN
Damjanich u. 1/C, I.8
H-8200 Veszprém
Hungario

Nikola Vapcarov: Kantoj de motoroj – Elektitaj versaĵoj, Sofia Pres, 1987, 116 paĝoj

Kantoj de motoroj — tiu bonaspekta, 116-paĝa libreto prezentas al ni 50 versaĵojn de la komunisto Nikola Vapcarov (1909—1942), unu el la plej gravaj revoluciaj poetoj de Bulgario. Liaj verkoj, karakterizitaj per socialisma realismo kaj revolucia romantiko, respegulas konvinke la mizeron de la popolo, la profundan amon de la aŭtoro al la vivo, al sia patrio kaj al la homoj kaj la certecon, ke la batalo kondukas al pli bela morgaŭo. Koncizaj, sed informriĉaj enkonduko, notoj de la kompilintoj kaj rimarkoj ĉe unuopaj versaĵoj helpas la leganton kompreni la verkojn de la batalema humanisto Vapcarov.
Tradukis la versaĵojn dek personoj — dank'ĝere granda nombro. Domaĝo estas la abundo de abortaj rimoj (vane — tamen, mortigita — milito, notkajero — aperas ktp.), pri kiuj oni legu detalojn en la artikolo „Fonetiko kaj rimado" de V. Benczik (HUNGARA VIVO 88/1, p. 13/14). PARNASA GVIDLIBRO pri tiu temo:

„Sed ‚nun alvenas mi al la plej forta',
al rimo, kiun nomas mi aborta,
kaj kiun uzas ĉefe niaj rusoj.
Ĝi sonas kiel dum kantad' la tusoj.
En ĝi ja rimas la radikoj nude,
sed la finaĵoj jam diverĝas krude.
Jen kontraŭ kio ĉiam mi ribelis.
Ĉu ĝi ne ŝiras al vi en orelojn?" (p. 92)

Kelkloke oni trovis adasismojn (ekz. neinstruita — ŝminkita, pafita — fulmoŝargita aŭ eĉ foliumas — cerbumi). PARNASA GVIDLIBRO:

„Rimfaro per la sama elemento
nur pri senpovo, aŭ maldiligento
atestas. Do, sufiĉa ĉi rimarko:
la adasismoj indas je elsarko." (p. 91)

Ĝenas ankaŭ tiaj vortformoj (ekz. fulmotondr', pugn', hurl', ĉambr'), pri kiuj validas la konsilo denove de PARNASA GVIDLIBRO:

„Do gardu vin, ke pro la apostrofo
al lango ne okazu katastrofo.
Afabl' kaj tondr' kaj majstr' kaj distr' kaj tiaj,
normalajn langojn igas konvulsiaj. (p. 95)

(PARNASA GVIDLIBRO: K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard, 3-a eldono, Edistudio, 1984)

Uwe Werner

Vaarandi, Debora: Ventolume Eesti Raamat, Tallinn 1986. 142 paĝoj.

La estonaj eldonaĵoj kutime brilas per elstara kvalito kaj lingvaĵo. Tio ankaŭ validas por ĉi tiu poemaro kun versaĵoj de D. Vaarandi, tradukitaj de Hilda Dresen, Salme Kärner kaj Jaan Ojalo. VENTOLUME estas muntaĵo el pli ol kvardekjara krea verkado. Tiuj poemoj ne taŭgas por rapida tralegado. Necesas iompostioma ensuĉado de versoj, kompreno kaj ĝuado de sentoj. La temaro estas vasta: Travivaĵoj el la milito, la homo kiel parto de la naturo, lirikaj komentarioj pri aktualaĵoj. La aŭtorino neniam sin perdas en ekstermonda filozofieco. Ĉiu priskribo de naturo kaj medita profundeco restas ligita al la realeco, al la homo:

Tristo jam herbejon premas,
ŝtormo flugis tra arbar'.
Sed la kampoj gajoplenas
pro l' abundo de garbar'.
. . .
Dum aŭtuno mi malsatas
pro grandega apetit' . . .
Ja grenkampojn, arbojn ŝatus
mi kunporti kun avid'!
(el AŬTUNE)

Ŝatanto de liriko kaj fremdaj kulturoj trovas en ĉi tiuj poemoj trezoron el la estona poezio. La poemaron akompanas desegnaĵoj de Tiiu Allikvee. Ili trafe ilustras la spiriton de la libreto.

Estas menciinde, ke enkonduka parolo peras iujn informojn pri la aŭtorino kaj ŝia verko. Tiel antaŭ ni ne staras anonima virino, sed matura lirikistino en la tradicioj de la altenstrebanta estona popolarto. Tion la versaĵoj respegulas same kiel la admiron al tiuj, kiuj en aliaj landoj batalas por pli bona, pli boneca mondo („Dolores Ibarruri", „Al Nazim Hikmet").
Resume mi nur povas rekomendi la poemaron, kiu estos malgranda, sed bela perlo sur librobreto.

Michael Lennartz

AULD, W.: La fenomeno Esperanto. Rotterdam, 1988. UEA. 120 p.

Tiu libro estas dediĉita al la centjariĝo de Esperanto. La avantaĝoj de la lingvo kaj la sukcesoj de la Esperanto-movado estas rekonsciigitaj, por ke la leganto estu ekipita per konvinkivaj argumentoj pri jenaj du faktoj: Esperanto vivas. Per ĝi la homoj el ĉiuj landoj povas pace kaj interkomprene ligi la manojn en kunlaboro (p. 8).

La aŭtoro rakontas-informas pri malfacilaĵoj en la ĉiutaga kaj en la diplomatia vivo, kiujn kaŭzas la lingvodiverseco. Li prilumigetas la tradiciajn solvojn de tiu problemo (pere de interpretistoj kaj tradukistoj, helpe de lerneja lingvo-lernado kaj per projektoj de universalaj lingvoj). Kaj kiel pinton de la homa inventemo li prezentas Esperanton (pp. 31—120), briligante ĝin el pure lingva vidpunkto (maksimuma internacieco, gramatika reguleco, altgrada fleksebleco, stabileco) kaj el socia vidpunkto (la historio de la E-movado inkluzive krizajn situaciojn). Kun fervoro la verkinto demonstras la rolon de Esperanto kiel literatura lingvo kaj kiel fortigilo de interhomaj resp. interkulturaj kontaktoj. Enestas en la libro du bazaj dokumentoj, parte kun komentoj: La dek ses reguloj (pp. 37—47) kaj La Parolado de Zamenhof ĉe la Unua Kongreso de Esperanto (pp. 109—115).

Se William Auld uzas bildesprimon por ilustri la signifon de Esperanto, li tutcerte antaŭvidis ankaŭ la pensasociojn ne ĉiam favorajn al la priparolita fenomeno:

„Same kiel kanalo estas planita rivero, Esperanto estas planita lingvo. Ĉar ĝi estas planita kun difinita celo, kanalo evitas la neoportunajojn kaj fizikajn limojn de riveroj, kaj kondukas laŭeble rekte al sia celo. Tiel ankaŭ Esperanto inter lingvoj." (p. 31)

Kanaligo de riveroj sendube plirapidigas la akvofluon, s e d samtempe negative efikas sur la ekologian ekvilibron!

Mi atentigas pri kelkaj „trorapidaĵoj" en la prijuĝo de la „nekanaligita" mondo:

1. „Ĉiu honesta edukisto devas konstati, ke lingvo-instruado en la lernejoj de la mondo reprezentas grandegan investon de tempo kaj rimedoj kontraŭ vere magra kaj nekontentiga finrezulto." (p. 24/25)

Ĉu vere la lerneja lingvolernado havas la solan celon, ke ĉiuj lernantoj post difinita tempo regu la fremdan lingvon? Ĉu ne enestas en la studprogramoj por fremdaj lingvoj ĝeneralklerigaj kaj edukaj postuloj, kies plenumo povas esti multe pli grava ol ia supraja praktika uzado de la lingvoj?

2. „La interpretisto staras en kunveno kiel eĥo en la centro de la universo. Li sekve tendencas trotaksi sin, konante la gravecon de sia rolo, sciante ke ĉiuj dependas de li. Multaj interpretistoj fakte akiris reputacion de netolerebla orgojlo . . . Laŭdire iuj estas paranojaj." (p. 16)

W. Auld enmetis tiun citaĵon por plicementi la starpunkton, ke interpretistoj inklinas montri sian potencon en la ebligo aŭ malebligo de kontraktoj inter ŝtatestroj.

Ĉu estas serioza argumentadmaniero, ofendi tutan profesian grupon por elvoki aplaŭdon? Kaj kiel la leganto interpretu la memlaŭdon de la aŭtoro sur la paĝo 81: „En tiu periodo (post la Dua Mondmilito — T. D.) la plej grava verko verŝajne estas „La infana raso" (1956) de Auld, eposo en 25 ĉapitroj, kiu neignoreble influis la poetojn kaj poezion de la lingvo."??

Ankaŭ la kanalo mem, t.e. la lingvo Esperanto, prezentatas en tro simpligita formo. Pri la avantaĝoj de la vortfarado Auld skribas interalie:

> „. . . el la vorteroj oni tute normale konstruas vortojn kunmetitajn, en kiuj ĉiuj ero konservas sian signifon, kaj la signifo de la vorto estas la sumo de la signifoj de la eroj, el kiuj ĝi estas kreita. Tiel normala en Esperanto estas tio ĉi, ke apenaŭ necesas citi ekzemplojn, . . . El tiu centprocenta aglutineco sekvas, ke ĉiu parolanto povas krei el la elementoj siajn proprajn vortojn — kaj esti komprenata de ĉiu alia esperantisto." (p. 34)

Ĉu ne estus pli fidinde konsiderigi, ke ankaŭ la aglutineco realiĝas nur enkadre de difinitaj reguloj (kondiĉe, ke oni agnoskas ilin) kaj ke sumigo de la signifoj de la eroj ne en ĉiu kazo aŭtomate liveras sencoklaran vorton (kondiĉe, ke oni respektas konvencion en la evoluo ankaŭ de Esperanto).

Kvankam temas pri jubilea retrorigardo, kiu ja alcelas prezenti Esperanton al la ekstera publiko kaj ankaŭ levi la animojn kaj plifortigi la kuraĝon de tiuj, kiuj laboras por Esperanto (laŭ la Enkonduko, p. 7), mi estus atendinta de tiu vere fama aŭtoro pli prudentan traktadon de la fenomeno Esperanto.

T. Dahlenburg

Nedelĉeva, Nevena: Dum nokta dejoro.

Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1987. 87 paĝoj.

Jen nova libreto el la libroforĝejo de HEA. La klapoteksto informas nin, ke oni esperas, ke ĝi estiĝas „ŝatata legaĵo de vastaj tavoloj de la esperantistaro".

La novelaro komenciĝas per la rakonto „La blankaj floroj". Ĝi estas tuŝa pledo por interkompreniĝo inter diversnacianoj kaj kontraŭ milito. Por mi ĝi estas la plej impresa rakonto de la tuta libreto. Simile altnivelaj estas la noveloj „La blanka ŝtono" kaj „La plej granda heroaĵo". Ili temas pri la zorgoj kaj heroaĵoj de patrinoj dum milito kaj hodiaŭ. La plej multaj aliaj rakontoj ne atingas la enhavan kvaliton de la cititaj titoloj. Ĉefe rolas en ili la plej ŝatataj herooj de esperantistaj aŭtoroj: la esperantistoj mem. Ni renkontas la „ŝajne grizajn, . . . ofte decide sortoturnajn momentojn de ĉiutagaj eventoj" (citaĵo el la klapoteksto) en persono de leterportisto, kiu konvinkas knabinon lerni Esperanton ke ŝi ricevu leterojn, aŭ en personoj de enamiĝintaj Esperanto-kursanoj.

Komprenu min: Mi ne scias, kial ni esperantistoj daŭre konvinkas aliajn esperantistojn pri la mirakleco kaj fabeleco de Esperanto. La aŭtorino sendube estas alttalenta, kaj mi estas certa, ke ni en estonteco ricevos legplezurojn el ŝia plumo.

Michael Lennartz

Malovec, Miroslav: Gramatiko de Esperanto. Třebíč, 1988. 102 p.

Tiu gramatiko imponas per sia precizeco kaj prezentmaniero. Sperta esperantisto trovas en ĝi konsilojn koncerne pli profundan komprenon de veraj aŭ ŝajnaj kontraŭdiroj en la morfologio, sintakso kaj vortfarado. Estas prilumigataj kelkaj fenomenoj surkampe de la stilistiko, vortprovizo kaj lingvoevoluo.
Esperanto estas prijuĝata kiel unu el la vivantaj, uzataj lingvoj, kiuj ja evoluas laŭ postuloj de la praktiko. Nia internacia lingvo slavice disponas je grandaj strukturaj avantaĝoj, kiuj kvazaŭ rekompencas ĝian „senpatrolandecon". Ni estas atentigataj pri evoluprocezoj en Esperanto, kiuj simile okazis kaj okazas en la naciaj lingvoj (ekz. la afiksiĝo de memstaraj radikoj kiel „ĉef-", la ekesto de nova speco de kunmetaĵoj kiel „grandlibro", la forigo de balastaj sufiksoj en la pasiva preterita participo kiel „kavita" anstataŭ „kavigita", la primara rolo de la kunteksto kompare al la preskribita vortuzo kiel en „Ŝi kombigis al si la harojn per servistino k u n ora kombilo"). La aŭtoro defendas la ekzistorajton eĉ de formoj kiel „martelilo" — kompreneble kun sencoŝanĝo (p. 15). Relative granda spaco estas dediĉita al analizo kaj priskribo de la verbosistemo (pp. 41—53), tute motivite, kiel ŝajnas al mi, ĉar en la formado kaj aplikado ekzemple de la aspektoj unuflanke naturas klarigenda subjektivo, aliflanke povas okazi „laŭleĝaj" miskomprenoj [ekz. la ripeta aspekto estas derivata per la prefikso „re-(reverki romanon), sed „re-" havas ankaŭ la memstaran signifon de „reen" (reveni hejmen)].
Aparte menciinda estas la klopodo de la aŭtoro, amplekse prezenti la ĝustan aplikon de la modalaj helpverboj (voli, devi, povi), ankaŭ sub konsidero de la vortordo (p. 48). Precipe por kursgvidantoj utilas la ekzemploj, kiuj demonstras la elekton de la konvenaj prepozicioj (pp. 57—65), la ĉapitroj detale okupiĝantaj pri vortsintakso (epiteto kaj suplemento), propoziciosintakso (subjekto, predikato, objekto, adjekto, predikativo) kaj pri frazsintakso (kunorditaj propozicioj kaj suborditaj).
Nur en malmultaj kazoj estas komparataj fenomenoj en Esperanto kun alimaniera problemsolvo en la ĉeha lingvo. Kelkfoje estas atakataj per laŭfaktaj argumentoj rekomendoj de PAG resp. de PIV [ekz. koncerne la uzon de la akuzativo post la prepoziclo „po" (p. 41)].
Elvokas ĉe mi dubojn jenaj asertoj resp. proponoj de la verkinto:
Paĝo 3: „La malfacilajoj en Esperanto do fontas en la malakordo inter la logika lingvo internacia kaj nelogikaj lingvoj naciaj." Tio estas — minimume — kontraŭdiro en si mem, ĉar Esperanto ne povas esti samtempe la tuto kaj parto de la tuto.
Paĝo 8: La konsonanto „h" estas envicigita en la voĉajn konsonantojn, kaj en la teksto, kaj en la tabelo. Mankas klarigo, ĉar verŝajne ne temas pri preseraro.
Paĝo 9: „La literoj havas kvar alografojn: minusklojn . . . kaj majusklojn, presajn kaj manskribajn." Ĉu la vorto „alografo" estas t. n. falsa amiko, kiu en Esperanto ne signifas varianto(j)n de unu grafemo por reprezenti difinitan fonemon en alia(j) vorto(j)?
Paĝo 29: „La artikolo estas uzata . . . antaŭ la vorto TUTA." Kion nun fari? Ĉu deklari la ekzemplon en PIV malĝusta („Unu ovo malbona tutan manĝon difektas.")?
Resume: La „Gramatiko de Esperanto" respegulas la nuntempan uzon de Esperanto en la buŝa kaj skriba praktiko kun konsidero de ekzistantaj variantoj (ofte kun la mencio „ne rekomendinde"). La aŭtoro detenas sin de unuflankeco rilate al prijuĝo de skemismaj resp. naturalismaj tendencoj en nia interlingvo. La nocio „logiko", en apliko al lingvo, oftas en la libro, sed restas finfine nedifinita — ĉu ne temas pri intermikso de la nocio logiko kun simpla reguleco?
Ni evitu la nocion „logiko", substrekante per tio, ke estas ja kontraŭlogike atendi de neetna lingva komunikilo kvazaŭ kopion de logika pensado.
La Gramatiko helpas al ni trovi sobran sintenon rilate al troigoj de la Analiza Skolo kaj rilate al tendencoj de ekstrema kreivemo en Esperantujo.

d-ro Dahlenburg

